

## La 29an de aprilo 2016

### Tertremoj en Kumamoto



**Kastelo Kumamoto, kies tegoloj falis kaj muroj difektiĝis.**

La 14an de aprilo okazis granda tertremo en la gubernio Kumamoto en la suda insulo Kjuuŝuu. Gia forteco estis magnitudo 6,8 kaj la grado de la tremo estis 7. Du tagojn poste, la 16an de aprilo, norde de la epicentro de la unua tertremo okazis alia granda tertremo kun magnitudo 7,3 kaj ĝia grado estis ankaŭ 7. Neniam antaŭe en Japanio okazis sinsekve du fortegaj tertremoj en unu regiono. Krom tio, ne nur en Kumamoto, sed ankaŭ en Ooita situanta oriente okazas tertremoj. Hodiaŭ estas la 29a de aprilo, do jam pasis du semajnoj, sed tremoj ne ĉesas.

\*Kiam okazis tiu tertremo en 2011, kiu kaŭzis grandan cunamon, mi sentis tremon de grado 5 en mia urbo. Eĉ tiu tertremo estis ne tolereble timiga. En Kumamoto jam okazis pli ol 40 fojojn pli fortajn ol tiu, kiun mi spertis.

Komparu la nombrojn de tertremoj en Kjuuŝuu kun la lastjaraj nombroj en la tuta Japanio:

	Japanio en 2015	ĉi-foje
Tertremoj (grado 1 ~)	1842	1037
Tertremoj (grado 4~)	44	97

Vi povas kompreni, kiel neordinara estas la ĉi-foja tertremaro.






Japanoj pli kaj pli multe atentis eblajn grandajn tertremojn kaj fortigas konstruaĵojn, sed oni ne antaŭvidis okazigon de sinsekvaj tertremoj kun grado 7. En Kumamoto multaj domoj postvivis la unuan fortan tertremon, sed ne plu la duan, kaj detruigis. Mi miris, ke difektiĝis kaj neuzebliĝis ankaŭ la publikaj konstruaĵoj kiel urbodomoj, lernejoj, gimnastikejoj kaj apartamentaroj, kiuj estis konstruitaj

sufiĉe forte laŭ la leĝoj. Krome okazis grandaj terfaloj, kiuj detruis vojojn kaj pontojn kaj malfaciligis la vivadon.

En Japanio oni trovis 2000 aktivajn faŭltojn kaj oni supozas, ke troviĝas kvaroble pli multaj kaŝitaj aŭ ne trovitaj aktivaj faŭltoj. Ĉie en Japanio troviĝas danĝeraj faŭltoj, kaj oni ne scias, kiam ili aktiviĝos. En la suba mapo de la insulo Kjuuŝuu troviĝas multaj ruĝaj streketoj, nome trovitaj faŭltoj, kaj la ĉi-fojaj tertremoj okazas laŭ la faŭltoj en la mezo kaj ĉe ambaŭ pintoj troviĝas du nukleaj centraloj. Tial multaj timas, ke la nukleaj centraloj Sendai kaj Ikata estos en danĝero.

\*Nun en Sendaj du reaktoroj funkcias, sed en Ikata ĉiuj reaktoroj haltas.



Tamen Nuklea reguligada aŭtoritato, kiu havas respondecon pri la sekureco de la centraloj, diris, ke ĝis nun neniu problemo okazis en la du

centraloj, do ne estas necese haltigi ilin. Kaj kompreneble la registaro kun ĝojo sekvis tiun ĉi rekomendon. Nukleaj centraloj havas alispecan danĝeron. Kiam okazas grava akcidento, ne nur estas malfacile haltigi ĝin, sed ankaŭ ĝi pligrandiĝas kaj ne regebliĝas. Tial en ĵurnaloj aperas nur opinioj kontraŭ la Aŭtoritato, sed neniam por ĝi.



Ankoraŭ nun tertremoj daŭras. Multaj homoj perdis sian domon. Ĉiuj timas dormi endome. Ne malmultaj dormas en sia aŭtomobilo, kurbigante sian korpon, kio kaŭzas ekonomi-klasan simptomon kaj pro tio jam dek kelkaj homoj mortis.

Multaj konstruaĵoj de lernejoj difektiĝis kaj ne uzebliĝis. Jam pli ol 500 gelernantoj translokiĝis al aliaj gubernioj. Kjuuŝuu estas tre ŝatata turisma loko, kaj majo estas la plej bela monato, sed jam plejmultaj mendoj estis nuligitaj. Hodiaŭaj bonaj novaĵoj estas refunkciigoj de la rapida trajno Ŝinkansen kaj aŭtoŝoseo.

Ekde la Japana Katastrofo en 2011, okazis erupcio de la monto Ontake en 2014, terfalo en la urbo Hiroŝima en 2014, granda inundo en Ibaraki en 2015, tajfunoj ĉiun jaron, kiuj kaŭzis multajn mortojn kaj perdojn de riĉaĵoj. Vere Japanio estas lando, kiun atakas kataklismoj, do ni ne plu volas havi kataklismon pro nuklea akcidento.